

Elias Salomon,

## Fiducit!

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

*“Fiducit” estas vorto el al studenta lingvaĵo el la 18a jarcento, kiu estas mallongigo de la latinaj vortoj “Fiducia sit”. Tiuj vortoj signifas laŭvorte tradukite: “Estu konfido” La esprimo estis uzata de la studentoj dum ilia kunvenoj en la senco de “Konsentite”.*

1. Kunuloj tri kunsidis  
For de bruanta mond’,  
Kaj iris la pokalo  
Kun ĝojo en la rond’.

2. Ridadis ili trinkante,  
Senzorge kun kontent’  
De l’mondo tagmizero  
Forflugis kun la vent’.

3. Ekmortis unu el ili  
Kaj dua la kunul’ -  
La tria nun solece  
Restadis jen trinkul’.

4. Kaj kiam la hor’ alvenis  
De tiu kolegi’,  
Li igis plenigi pokalojn  
Kaj kantis kun energi’.

...

5. Sidante iam kun liro  
 Ĉe manĝo en la hal',  
 Subite falis larmo  
 En vinon de pokal'.

6. "Al vi, kunuloj, trinkas  
 Mi nun; sed kial vi  
 Silente nek moviĝas?  
 Pro kio restas mi?"

7. Jen glasoj tri eksonis  
 Kaj malpleniĝis du:  
 "Al via, gaja kunulo!" –  
 - Li jam ne trinkis plu! -

*Traduko de la Germana poemo "Fiducit!" de ELIAS SALOMON (\*1814 – †1885) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

*Arg-84-168 (2004-03-26 20:56:02)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro "Esperantista Kantaro", kiu enhavas tradukojn de germanaj kantoj. La tradukoj estas faritaj de Ludwig Emil Meier. La libro estas eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann (Steglitzer Str. 44, Berlin, Germanio).*